

ESTRARO
de
« **ESPÉRANTO-GIRONDE** »

Centre Culturel Château Palmer
33150 CENON
Banque Postale :
347771 F Bordeaux





Prezidanto : Bernard SARLANDIE
24 rue des Bosquets de Venteille
33185 LE HAILLAN
Tél. : 06 83 29 40 13
Mail : bernard.sarlandie@gmail.com

Sekretario : vaka posteno

Kasistino : Monique DUSSENTY
76 avenue La Fontaine
33560 CARBON BLANC
Tel : 05 56 06 74 49
Mail : monique.duss@free.fr



APRIL 2013



La « *Esperanto-Gironde* » Informilo

N° 134

*La magia trajneto baldaŭ eniros la stacidomon , lundon
vespere, la 6an de majo, en la salono de la MPS en Arti-
gues-près-Bordeaux, okaze de la kongreso IFEF kaj UFE,
de la 4a ĝis la 11a de majo 2013.*

**SPEKTAKLO
2013**



**LA
KOMPANOJ**

Ljuba GRIGORIEV – 11jara siberiano

*LA KOMPANOJ sur la reloj
Brigitte, Christiane, Claudine, Janine, Gloria, Monique, Morine, Rose
Bernardo, Ĵanseb, Joël, Lino, Marcelo, Michel, Tjeri, Yannick*

TUT - PIRENEA ESPERANTO-KORUSO

Por la dua fojo mi partoprenis en la TUT-PIRENEA ESPERANTO KORUSO (tutpeko), sub la respondeco de JORGOS, ĉijare en La Bastide sur l'Hers, en katarisma Nord Pirene-ejo.

Brila suno beligis dum dek tagoj el dekunu tiun allogan urbeton de Arieĝujo, borde de fiŝoriĉa rivero Hers.

Ĝis 25 korusanoj ĝoje kantis sub la taktobastoneto de Zvradka, bulgara korestrino, gaje certe sed tamen intense. Pruvo estas ke, post ses tagoj, po 5 horoj tage da provkanto, ni povis proponi 17 kantojn, koncerte, en kvar eĉ kvin pupitroj, unue en La Roques d'Olms, en Junulardomo, due en La Bastide mem, antaŭ maljunuloj kiuj, longtempe, memoros pri tiu kantanta post-tagmezo. Pri registro zorgis Mariane kiu, afable, donis ekzempleron al kiu deziras rememori tiun eventon.

Ni ankaŭ bonŝance ĉeestis du koncertojn : « Voĉoj de virinoj » en Saint Quentin la Tour. La unua loka ensemble, « Amnéris », en kiu kantas Jani, Marianne, Claude, prezentas opero-ariojn ; la dua « Divagabondes », normanda ensemble de la urbo Caen, inter kiuj unu esperantistino, aŭdigis nin originalajn kaj mirigajn tutmondajn kantojn, humorajn aŭ sentoplenajn.

La kelkaj korusanoj de INTERKANT restis du tagojn pli por provludi la spektaklon de Karmena, en kiu Robin alvenis por deklami la tekston duope kun Franjo. Tiam estis okazo, malgraŭ serioza laboro, de vera amuziĝo.

Ni disiĝis, lacaj sed feliĉaj, en la perspektivo revidi nin en pluraj okazoj dum tiu jaro, eble pli ...



Monique

STAGE D'ESPERANTO

SAMEDI 25 et DIMANCHE 26 MAI 2013

au MOULIN de PIOT à CHENIERS (CREUSE)

organisé par ESPERANTO-INDRE et ESPERANTO-LIMOUSIN

Accueil dès le vendredi soir à 18H ou le samedi matin à partir de 9H

- INITIATION A L'ESPERANTO avec I. JACOB et G. CONCHE
- PRATIQUE ORALE pour les "PROGRESANTOJ" avec Jeanne-Marie CASH et Maryvonne HOUVIEZ
- PRATIQUE de la LANGUE avec Christian LAVARENNE
- PREPARATION aux KER-EXAMENS avec Pjer BOUVIER

COÛT du STAGE, HEBERGEMENT COMPRIS: 50€

RENSEIGNEMENTS: esperanto.indre@esperanto-indre.com

Maryvonne HOUVIEZ: 02 54 27 95 51 ou 06 78 90 92 17

Isabelle JACOB: T: 05 55 03 54 76 isabellejacob@voila.fr



La 21an de marto, Sabine Ardouin, amikino de longtempe, forlasis nin. Ŝiaj multnombraj amikoj akompanis ŝian foriron en la preĝejo de Margueron. Ni invitas ĉiujn kiuj konis ŝin sendi kelkajn vortojn, memorojn, fotojn, ĉu al Marcelo, ĉu al Monique, cele al speciala venonta LEGI dediĉita al ŝi.

Monique

22-26 juillet : Pratique de la langue (1^{er} et 2^{ème} niveaux)

Rafaello Mateos

Pratique de la langue : débutants et faux-débutants

Rafael enseigne l'anglais dans le système éducatif public en Espagne. Depuis 6 ans, il enseigne l'espéranto dans de nombreux pays : Espagne, France (Grésillon et Saint-Raphaël), Hongrie, Chine (pendant six mois, dans les villes de Baotou, Foshan et Canton), au Maroc, en Arménie, en Ukraine (à Kiev et Yalta), en Turquie (à Istanbul et Gaziantep). Sa technique d'enseignement se rattache aux méthodes dites "directes", sans utilisation de la langue nationale, avec des ajustements personnels.


Josée Lafosse : Pratique de la langue (2^{ème} niveau)

Josée Lafosse, institutrice retraitée, enseigne l'espéranto depuis longtemps. Elle a participé aux rencontres de Plouezec comme animatrice de cours et d'atelier théâtre, et a souvent animé des cours (débutants et 2e niveau) à Bouresse. Le stage permettra de pratiquer l'espéranto en abordant des thèmes de la vie courante sous la forme de conversations, petits débats, mises en situation... Bien sûr il y aura des chansons, de la poésie, des jeux... Venez pour échanger, prendre et donner.



Ni ĉiuj, amikoj de Esperanto-Gironde, deziras al Danielle Guillaume, kiu trapasis malbonan sanperiodon, rapidan resaniĝon. Ni scias, ke René kaj Danielle, kuraĝe, alfrontas tiujn tagojn, kaj ni esperas revidi ilin en niaj baldaŭaj renkontoj.

Monique



HEROO KONTRAŬ KANCERO Jean-Alban BERGONIE

En oktobro 2012, la Nacia Akademio pri Sciencoj, Beletroj kaj Artoj de Bordojo festis sian tricentjariĝon. Taŭga okazo por portreti tiujn sciencistojn, beletristojn, artistojn, kiuj famigis ĝian historion.

Filoj de trinkejstro ne abundas en la Akademio. Sed kompreneble ne tio pravigas la voĉdonan elekton, en 1895, de Jean-Alban BERGONIE, kies patro estris la trinkejon en Casseneuil (departemento Loto-Garonio).

En tiu tempo, la kuracisto, fakulo pri medicina elektro, jam faris gravajn malkovrojn, aparte la « leĝon Bergonié kaj Tribondeau », kiu elmontras ke ju pli ĉeloj multobliĝas des pli ili estas radiosentivaj. Li tiel estis unu el la pioniroj de la radioterapio, esplorante danĝerojn de la X radioj, ne ŝirmante sin mem. Tiel li mortis en 1924 pro induktita kancero. Li, la unua, konceptis kontraŭkancerajn institutojn. Sed la malsano ne lasos al li tempon inaŭguri la unuan kreitan en Francio. Ĝi portas lian nomon. Sur bankardo li alestis al la ceremonio pri ĝia ekkonstruo en Bordojo, en 1924.

Tiu eminentulo ne estis nur enlaboratoria esploristo. Profesoro ĉe la medicina fakultato, li fakiĝis kaj praktikis ankaŭ dummilitan kirurgion. Li tiel pruvis la efikecon de la X radioj por malkaŝi pafaĵojn kaj faciligi ties el-tiraĵon. En 1914, 57 jaraĝa, li dungiĝis en hospitaloj por savi multajn vunditojn dank' al memelpensita « elektra vibrilo ».

Li estis unu el la unuaj kiuj prizorgis pri reedukado kaj readaptado de la militvunditoj.

Jean-Alban Bergonié estis ankaŭ valora biciklokonkuranto, nelacigebla vojaĝanto, partoprenanto en la unua egipta kongreso de medicino en 1903, humanisto, tute sinofera kuracisto, eksterordinara sciencisto, kaj ankaŭ altvalora soldato. Iniciinto de Esperanto, li estis unu el la unuaj membroj de la bordoza esperanto klubo en 1902.

La kvinopa klubo de Cenon

29 avril- 3 mai: Découvrir le Haut-Poitou – histoire et nature, avec Catherine Kremer et Brian Moon

Kvinpetalo est situé au milieu d'une région d'un grand intérêt touristique, avec des atouts tant naturels que culturels. Pendant cette semaine nous proposons un programme comportant des promenades dans la nature et aussi des excursions à des lieux connus et moins connus du Haut-Poitou. Certaines visites seront commentées par Catherine Kremer, guide-conférencier.

11-14 juin : Journées japonaises

Déjà connus pour leurs multiples tournées en France, **Hori Jasuo et Arai Toshinobu** feront plusieurs présentations richement illustrées sur différents aspects de la vie quotidienne dans le Japon actuel. Ils seront hébergés au centre mais interviendront aussi - avec traduction simultanée - pour le public francophone de Bouresse et des environs.

22-23 juin : Répétition et Spectacle du Chœur Interkant' autour de Carmen, conditions d'inscription particulières.

Un concert-spectacle autour de l'opéra "Carmen" de Bizet sera présenté par le chœur interrégional "Interkant", avec des explications en français, de la musique en espéranto et des danses. Le spectacle aura lieu le dimanche 23 juin dans la salle des fêtes de Bouresse.

12-18 juillet : Stage de musique. animateurs : famille Markov

Pendant ce stage, l'espéranto sera pratiqué de diverses manières autour de la musique. Les animateurs proposeront divers thèmes de discussion en rapport avec la musique. Cette année, la priorité sera donnée à la création originale en espéranto : quel est l'état du mouvement à ce niveau, comment évolue-t-il, et quelles sont les perspectives ?

Des œuvres musicales originales en espéranto seront travaillées, au niveau du chant mais aussi au niveau instrumental. Le stage s'achèvera sur un concert, pendant lequel les participants présenteront le résultat de leur travail devant un auditoire local. Le contenu précis du stage pourra être modulé sur place en fonction des attentes et des suggestions des stagiaires. Il n'est pas nécessaire d'être musicien professionnel (ou amateur de haut niveau) pour participer. Des cours pour débutants ou faux-débutants sont prévus en parallèle des discussions en espéranto.

KVINPETALO
PROGRAMME 2013

15-19 Avril. Pratique de la langue : 1^{er} et 2^{ème} niveaux

1^{er} niveau (débutants, faux débutants) : Philippe Cousson

2^{ème} niveau : Jouons et chantons avec Jean-Luc Kristos

JOUONS et CHANTONS pour PARLER un peu, beaucoup, passionnément ! Il s'agira de communication orale simple, avec du vocabulaire de la vie de tous les jours, dans une ambiance joyeuse, ludique et en chansons.

Joloko vous proposera des jeux variés pour vous inciter à vous exprimer de plus en plus. Vous pourrez jouer seuls, en équipe ou en groupe. L'objectif est la **communication de tous les jours** ; l'ambiance sera joyeuse et ludique, avec des chants accompagnés au piano. Dans le cadre de ces jeux, ou à la demande des participants, des points de grammaire seront abordés... Si vous connaissez plus ou moins les règles écrites de la langue mais que vous ne vous sentez pas encore le courage de vous exprimer à l'oral, ce cours est fait pour vous !

21 avril—ASSEMBLEE GENERALE DE SYM A 10 HEURES

22-26 avril :

Stage de traduction et préparation au [Certificat d'études supérieures](#) avec Brian Moon

Là où se croisent diverses langues, il est toujours nécessaire de recourir à la traduction, mais une bonne maîtrise de la langue et une capacité à bien traduire ne vont pas toujours de pair. L'art de la traduction nécessite un entraînement spécifique, et c'est justement ce que nous ferons au cours de cette semaine, en traduisant en espéranto des textes francophones les plus divers.

L'objectif est de pratiquer la traduction de haut niveau, mais aussi d'améliorer le niveau linguistique des participants, l'analyse de problèmes de traduction permettant d'éclaircir certains aspects de la langue. Les participants de niveaux variés sont par conséquent les bienvenus.

Le cours convient aussi pour la préparation aux épreuves de traduction du [Certificat d'études supérieures](#) de l'Institut Français d'Espéranto.



LA Poste émet un timbre en taille-douce commémorant Raphaël Élizé (1891-1945), premier maire de couleur de France métropolitaine.

Né en Martinique au Lamentin le 4 février 1891, dans une famille bourgeoise, il rejoint à l'âge de 11 ans la métropole où il effectuera ses études qui le mèneront au diplôme de vétérinaire.

Partisan de l'espéranto, langue universelle, Elizé considérait que l'enseignement et que le développement d'une langue internationale faciliterait les relations entre les peuples. Il espérait que « l'espéranto soit encouragé, développé et introduit progressivement dans les programmes scolaires ».

LA SAGO N° 92
FEBRUARO 2013



Portrait d'une personnalité créole : Raphaël Élizé

Démobilisé en ayant été décoré de la Croix de Guerre à la fin de la première guerre mondiale, il s'installe dans la petite ville de Sablé-sur-Sarthe, située dans une région réputée pour son élevage bovin, pour y exercer son activité.

Dès 1924 il se lance dans la politique en adhérant à la section locale de la SFIO (Section française de l'Internationale Ouvrière), parti politique d'obédience socialiste.

Candidat malheureux aux élections municipales de 1925, il est élu maire de sa commune dès le premier tour en 1929, devenant ainsi le premier homme de couleur à assurer cette fonction en métropole.

Histoire méconnue d'un Martiniquais efficace et engagé

Homme de progrès, très proche de ses concitoyens, ses différents man-

ats lui permettront de faire construire une piscine, une cantine municipale, un stade de foot et de moderniser fortement les infrastructures de Sablé-sur-Sarthe.

Mobilisé en septembre 1939 en tant que vétérinaire, il est démobilisé l'année suivante et ne peut reprendre sa place de Maire, destitué par l'autorité allemande. Il entre alors dans la Résistance et est arrêté sur dénonciation en 1943. Torturé, déporté au Camp de Buchenwald en 1944, il y trouvera la mort, suite aux blessures reçues lors d'un bombardement.

Depuis la Libération, la place de la mairie de Sablé porte le nom de Raphaël Élizé. La ville du Mans lui a aussi rendu hommage en lui dédiant une place le 19 janvier 2011.

METABIEF

Mi revenas de Métabief, en la regiono Juraso, kie okazis la 68a kongreso de Sat-Amikaro, de la 30a de marto ĝis la 2a de aprilo 2013.

Pro mia partopreno en la koruso Interkant, mi ne povis ĉeesti la tutajn prelegojn. Tamen rezultas de diversaj debatoj ke pli kaj pli mankas homoj, fortoj, bonvolemoj por helpi la tro malgrandan skipon kiu viviglas la asocion kaj prizorgas ĝiajn taskojn. Alvoko al kandidatiĝo, jam antaŭe farita, rezultigis ankoraŭ neniun konkretan sinproponon.

Same por la redakto de la revuo La Sago kies skipo malgrandiĝas, kaj ĝia deveno estas nun kun demanda punkto.

Mi konstatas ke, en pli malgranda skalo, ni vivas la samon en Espéranto-Gironde. Neniu kandidato por la posteno de sekretario de ... 8 jaroj ! Same por nia revuo LEGI kiu baldaŭ fariĝos « persona revuo » ĉar mi, por ĉiu numero, strebas por plenigi la paĝojn...

Mi ŝatis la kulturalan programon dank'al tri kantistoj, je tute malsamaj stiloj ; Jolane, Anjo Amika kaj Manùel.

Kion diri pri « Ĉirkaŭ Karmena » ? Tutsimple ke ĝi renkontis plenan sukceson kaj ravis la tutan asembleon. La deklamado de Franjo kaj Robin, la solistino Zravdka, la kvar dancistinoj kun la pianistino Muriel, kaj kompreneble la 40 korusanoj, el kiuj mi estas, « klopodis sen limo per korpo kaj animo ». Baldaŭa rendezuo en Artigues apud Bordeaux.



Ankaŭ mi ŝatis :

- la viziton de la fuorto Joux (sub suna vetero), kie oni enkarcerigis famajn homojn, inter kiuj eble la plej faman Toussaint Louverture kiu trovis netoleran morton.

- la tutagan trilandan translimadon, laŭ la rivero Doubs kaj ĝiaj klifoj, kiu rezervis al ni agrablajn surprizojn :

- la nekredoblan respublikon Saugeais kun ĝia ĉefurbo Saint-Benoit kaj ĝia abatejo, kun ĝiaj opereto-doganistoj kiuj donis al ĉiuj po unu oficialan pasporton, kun ĝia prezidantino de post 2006.

- la saluton de reprezentanto de la vilaĝa konsilio Les Brenets sur la limo inter Francio kaj Svislando.

- la trian neordinaran ĉeliman lokon, en Col des Roches kie situas unikaĵo en Eŭropo, eble eĉ en la tuta mondo, impresaj kaj imponaj subteraj muelejoj.

Dankon Mirejo pro tiuj mirindaj vizitoj.

Kion diri ankaŭ pri la vetero ? Ni ĝuis veran jurasan veteron, kun bela neĝo, kun nebula vidaĵo sur mildaj, rondaj, montetoj, kun tamen unu tre suna tago kiu fandis tiun blankecon kaj malkovris grundojn pretajn por ricevi la unuajn verdaĵojn..

